



**Balkano:
inter najbaroj
malpli da baroj**

**Rajto
je minimuma digno**

**Vakcino
preventas
kancerojn**

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Eldonjaro: 2005

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 270 paĝoj,

ISBN: 90-77066-18-07; prezo ĉe FEL: 20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 12 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Rajdado: celen sursele 11



Antaŭ 600 jaroj la Litova Granda Duklando etendiĝis ĝis la Nigra Maro kaj estis la plej granda ŝtato en Eŭropo. Ĝis nun en Litovio vivas legendo, ke la litova granda duko Vytautas sian ĉevalon trinkigis per nigramara akvo.

Onidire en la nuna teritorio de Ukrainio, proksime al Odeso, ankaŭ hodiaŭ pendas memortabulo pri Vytautas la Granda.

Vakcino preventas kanceron 14



La unua efika kontraŭkancera vakcino estis vakcino kontraŭ hepatito B. La viruso de hepatito B kaŭzas ne nur la akutajn formojn de la malsano, sed ankaŭ ĉe iuj malsanuloj kronikan hepatiton kaj en apartaj kazoj (verŝajne kune kun iuj aliaj faktoroj) cirozon kaj eĉ heptatkanceron. Ĉar vakcinado kontraŭ hepatito B efike preventas ĉiujn formojn de la malsano, el tio sekvas, ke ĝi preventas ankaŭ heptatkanceron. En multaj landoj tia vakcinado jam estas enigita en la kalendaron de devigaj vakcinadoj.

Centjariĝo de Patrino Tereza 16



La 26an de aŭgusto 1910 naskiĝis la verŝajne plej fama virino en la mondo, Patrino Tereza. Ŝia origina nomo estas Gonxhe Bojaxhi [gonĝe bojaĝi], albandevena.

Fruaĝe ŝi jam komprenis, ke ŝi havas mision je la nomo de Dio por servi al la plej malriĉaj inter la malriĉuloj. De Prizeren (Kosovo) al Skopje (Makedonio), poste al Zagrebo (Kroatio) kaj Dublino (Irlando) ŝi maturiĝis kiel vera misiisto kristana por definitive instaligi en Kolkato en Barato.

FOTO DE LA KOVRILO: SARA G

moderna vivo

OPINIO	8
Neniam plu	
JURO	9
Alklake konsiliĝi	
PEDOFILIO	10
Emblemoj perversiulaj	
BALKANO	10
Inter najbaroj	
malpli da baroj	
RAJDADO	11
Celen sursele	
INTERNACIECO	12
Monda kulturo apud la maro	
MALLIBEREJOJ	13
Rajto je minimuma digno	

scienco

SANO	14
Vakcino preventas kanceron	

spirita vivo

ALBANIO	16
Centjariĝo de Patrino Tereza	

novelo

ANALOJ DE BAILENAMBEANN	17
Ŝanĝiĝanta mondo	

eseo

DATREVENOJ	21
Homo universala, homo moderna:	
Johann Joachim Becher	
naskiĝis antaŭ 375 jaroj	

enigmoj

Flaŭra enigmo.....	24
Solvo de la litera sudoku	
(Monato 6/2010).....	26

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj.....	6
› El mia vidpunkto.....	7
› Anoncetoj.....	27

► Rekto al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be.
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	25	28	15	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	67
Estonio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Grekio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hispanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hungario	HUF	8100	8900	4860	1530	2500
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Latvio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Litovio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	25	28	15	5,5	9
Slovakio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Slovenio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	85
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, 4/23 Albue-
ra Street, Battery Poooint Tas 7004, Australia.
Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.
Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140,
2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.
Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de
Britio, Esperanto House, Station Road, Bar-
laston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio.
Reto: eab@esperanto-gb.org.
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,
290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto
de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,
variab. symbol por gazeto Monato: 07001.
Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-
havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45
21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-
93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de
Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530
Helsinki, Finnlando.
Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis,
rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D
Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
► Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer
Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero:
0 420 933 400, BGN: 290 400 90)
Reto: robo.espero@acn-mail.de.
► Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303
Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk
91856-676 (BLZ 54510067)).
Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
► Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang
Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129
Mainz.
Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,
Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa
d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794).
Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest,
Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, Dublin 12.
Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via
Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:
37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,
Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.
esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a
Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,
Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

- ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro
Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
Reto: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,
1000 San José. Reto: miaumiaul@ice.co.cr.
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti
Duh 130, HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas
35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371
6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187,
LT-01003 Vilnius-C, Litovio.
Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394
Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111
0089 3612 0000).
Reto: wickler.albert@gmx.net.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam.
Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf
Schous vei 18, 0572 Oslo 5.
Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry
Way, Long Bay, North Shore City 0630.
Reto: gdewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117
m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-
1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV
O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,
R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239
Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- **Ruslandaj:**
► Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-
grad, ab. ja. 1248, Ruslando.
Reto: sezonoj@gazinter.net.
► Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006
Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.
Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:
42301.810.3.0018.0084867.
Reto: mikaelo@km.ru.
- **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića
14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.
+381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.rs.
- **Slovenaj kaj Slovakaj:**
► Siŝnja Branković, Va Parini 5, I-34129
Trieste. Reto: visnja.brancovic@os.htnet.hr.
► Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,
HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview
Crescent, Milnerton Ridge, 7441.
Reto: beckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
► Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-
ranto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123
52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
► Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet
Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35
Hörby, Svedio.
Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn
6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7
Basel. Reto: ch_scheidegger@bluwin.ch.
- **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,
CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1
510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org.

Dekstraj tendencoj



La sukcesoj de la sin tiel nomanta „te-partio” en Usono alarmas ne nur demokratojn en tiu lando. Ke tiu movado denuncas prezidanton Obama kiel „socialiston” estas nur nuanco en ties batalo por dekstregaj ideoj. En Usono vera „socialismo” ekzistis neniam, alimaniere ol en Eŭropo, do la riproĉoj kontraŭ Obama estas ridindaj en la oreloj de eŭropanoj. Sed en la malnova kontinento la fenomeno de dekstrismo aperis jam antaŭ multaj jaroj. Pli kaj pli fortiĝis en multaj landoj dekstregaj partioj; en iuj landoj – ekzemple en Hungario – ili eĉ regas aŭ kunregas. En Aŭstrio, Italio, Danlando, Belgio, Nederlando, Svedio, Pollando, Rusio, Serbio, Kroatio, eĉ en Svisio dekstregaj populismoj gajnis multajn adeptojn. Ili nutras sin per sloganoj kontraŭ „fremdu- loj” kaj precipe ofte kontraŭ islamanoj.

Ankaŭ la franca prezidanto Sarkozy [sarkozi] denove ludas la dekstran karton. Kiam li estis ministro pri internaj aferoj, li batalis kontraŭ alĝerianoj, nun li malpermesas al islamaj virinoj porti vualojn kaj laste amase forpelas romanojn el Francio. Dekstregaj populismoj batalas kontraŭ moskeoj kaj denuncas ĉiujn islamanojn kiel „teroristojn”.

Mirigas tamen unu granda escepto: en Germanio ja ekzistas ankaŭ kelkaj dekstregaj populismoj, sed ili neniam sukcesis en tiu demokrata lando vere mobilizi tiom da homoj, ke oni povus paroli pri dekstrega movado, kvankam ankaŭ ne malmultaj germanoj malŝatas ekzemple islamanojn. Sed ili ne subtenas dekstregajn partiojn, kiuj en balotoj kutime gajnas nur kelkajn procentojn. Tion oni ne ŝuldas al la demokratiaj partioj, sed ĝi estas historia sperto, kiu tre profundas en Germanio. Post la terura nazia reĝimo kaj malvenko en la 2a mondmilito, germanoj absolute ne volas denove persekuti minoritatojn kaj fremdulojn kiel Hitler, kiu murdigis milionojn da judoj, ciganoj, samseksemuloj, komunistoj, handikapitoj, kristanoj, eĉ esperantistoj. Se nun iuj malmultaj novnazioj manifestacias sian ideologion en iu urbo, tuj amase protestas homoj kontraŭ la bruna hordo. Faŝismo do en la hodiaŭa Germanio ne havas tian ŝancon kiam ĝi denove gajnis en multaj aliaj pli-malpli demokratiaj landoj.

Kiam oni lernos ankaŭ tie, ke libereco validas ne nur por propraj popoloj, sed por ĉiuj homoj?

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 31a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc- tarifo: n-ro g; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vis- spaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redak- toro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzel- langasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijkplei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzon oni ne sendu al la redaktoro proprajinitate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario.
Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** sendu

viajn kontribuojn al la eldonejo:

Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzel- langasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Einstein unulingva?

En MONATO 2010/7 (p. 20) Walter Klag asertas, ke Albert Einstein „neniam lernis alian lingvon” (ol la germanan, supozeble, kiu estis lia gepatra). En 1933 Einstein elmigris al Usono, kaj en 1940 li iĝis usona civitano – tio apenaŭ eblis sen kono de la angla lingvo. Cetere, li regule prelegis ĉe Princeton – ĉu germanlingve? Estas ankaŭ konate, ke li, dum sia usona periodo, ofte parolis kun infanoj (kaj fojfoje helpis ilin solvi siajn matematikajn hejmtaskojn) – ankaŭ tio apenaŭ eblus, se li scipovus nur la germanan.

Gunnar GÄLLMO
SVEDIO

Monato per iPad

Dankon pro la artikolo pri iPad (MONATO 2010/6, p. 20-21). Ĝi helpis min decidi aĉeti la aparaton. Per iPad oni facile povas tralegi la revuon en la PDF-dosierformo kaj eĉ ĝui la grafikan kvaliton pli bone ol en la presita versio: belegaj koloroj kaj bonega tekstkvalito! Plaĉas al mi la varieco de la artikoloj, la recenzitaj libroj (ankaŭ haveblaj por iPad malmultekoste). Mi interesiĝas pri ĉiuj aspektoj de la zamenhofa heredaĵo: Esperanto kiel universala lingvo, homaranismo kiel universala religio, kaj nun haveblas Monato kiel enkonduko al mondciivitismo. Koran dankon!

Robert Poort
USONO



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en Monato. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de Monato.

Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Sen perspektivo

Stefan MAUL

En printempo 2003 la tiama usona prezidento George W. Bush [ĝorĝ dablju buŝ] kun sia brita pudelo Tony Blair [teŭni blea] komencis la kriman militon kontraŭ Irako. Duonan jaron poste mi provis starigi unuan bilancon post la *fulmomilito* („Kompatindaj irakanoj”, novembro 2003, p. 9). Ĝi estis katastrofa. Nun, sep jarojn poste, mi povus preskaŭ laŭvorte ripeti tiun komenton, kvankam nun Usono retiris siajn bataltrupojn el Irako. La multjara milito ekstermis tre multajn homajn vivojn. La 31an de aŭgusto 2010 oni kalkulis, ke pli ol 100 000 irakanoj estas mortigitaj, kaj mortis ĝis tiam 4420 usonaj soldatoj.

Aŭroro ...

Restas 50 000 usonaj armeanoj en la lando; nun la misio havas novan nomon „Operacio Nova Aŭroro” post la antaŭa „Operacio Iraka Libereco”. Ĉu vere la nuna usona prezidento Barack Obama, kiu heredis tiun militon de Bush, kredas je aŭroro? Ĉu vere Irako nun estas libera? Kaj ĉu la restantaj usonaj soldatoj sukcesos krei kaj garanti tiun? Kiu estas la faktaj rezultoj de la milito? Ĉu Usono atingis siajn celojn?

Obama plenumis sian promeson el la elektokampanjo, deklaris la militon oficiale kiel finitan kaj rekondukis plej grandan parton de la armeo hejmen, sed li evitis ĉiun signon de triumfo. Por tio ankaŭ ne ekzistis ia ajn kialo. Jes, Usono forigis la irakan despoton Sadam Husajn, sed kiun alian celon ĝi atingis? Libereco? Jes, de despotismo, sed por kio? Por malsato, senlaboreco, mizero kaj malsano. Sekureco? Ĉiun minuton irakanoj devas timi memmortigajn atencojn kaj aliajn murdajn agojn. Polico kaj armeo ankoraŭ dum longa tempo estos tro malfortaj por

vere sekurigi la landon. Bonfarto? Ne por ordinaraj civitanoj. Mankas eĉ plej bazaj publikaj servoj, pura trinkakvo, elektro kaj aliaj energioj, taŭga transportsistemo. Anstataŭe irakanoj devas vivi kun floranta koruptado. Demokratio? Ho jes, okazis iuspecaj balotoj, sed eĉ multajn monatojn post la parlamentelektioj la politikistoj ne kapablis establi funkciantan registaron. La lando perdis multon, sed gajnis nenion.

Perdoj, perdoj

Ankaŭ Usono mem perdis multon. Ĝis meze de 2010 la Irak-milito kostis pli ol 700 miliardojn da usonaj dolaroj. Tio draste plialtigis la usonan buĝet-deficiton kaj tiel grave plifortigis la ekonomian krizon de la lando. Ne mirige, ke intertempe 70 procentoj de la usonanoj kontraŭas la militon (tiom da estis jam komence en Eŭropo), 60 procentoj postulas ankaŭ retiron de la trupoj el Afganio. Kiam oni mem

ne fartas bone, ne interesas problemoj de fora lando, sed hejmaj zorgoj pri laborlokoj kaj ŝtatŭldoj. En sia parolado al la nacio okaze de la militfino en Irako Obama tial parolis malmulte pri la milito, sed multe pri la hejmaj problemoj. Li promesis akceli la usonan ekonomion. Sed kiel la prezidanto volas fari tion, li ne diris.

Silento

Entute estas interese, pri kio Obama ne parolis. Ekzemple pri la fakto, ke la granda ŝtato terure damaĝis sian reputacion en la tuta mondo pro tiu multjara milito. Aŭ pri la fakto, ke la iraka haoso plifaciligis fortiĝon de najbara Irano kiel regiona potenco. Kial la prezidento silentis pri tiu terura heredaĵo de Bush, kiu arbitre kaj kun mensogoj komencis la militon? Kial Obama milde kovris mantelon de silento super tiu katastrofa bilanco? Lia politikaj kontraŭuloj ne dankos pro tio al li. La viro, kiu antaŭ preskaŭ du jaroj ekoficis por ŝanĝi eble ne la mondon, sed almenaŭ sian landon, evidente ne scias, kion li nun faru.

Usonanoj ne havas perspektivon, sed eĉ pli negativan havas irakanoj. Kiu rekonstruos ilian komplete detruitajn kaj ruinigitajn landon? Kiu helpas akceli la ekonomion? Kiu forigos mizeron? Kiu donos sekurecon? Kiu restarigos homajn rajtojn? Estas hontego. ■



LISA NORWOOD

Kial la prezidento silentis pri tiu terura heredaĵo de Bush?

Neniam plu

En la somero de la jaroj 1984 kaj 1985 ni feris en la Loire-regiono de Francio. Ambaŭokaze ni pasigis du semajnojn en malnova kastelo, kiu funkcias hodiaŭ kiel ferio- kaj studo-centro por francoj kaj eksterlandanoj. Dum nia restado en 1985, ni ĉeestis interesan prelegon pri norvegaj kantoj, faritan de milda, modesta norvego, s-ro O.T.

Dum la vivo, ĉiu el ni (krom se ni loĝas en tre izolitaj regionoj) konatiĝas kun granda nombro da personoj, kiuj ne faras apartan impreson. Tamen, kelkfoje – eble ne ofte – ni renkontas iun, kun kiu, je la unua vido, ni tuj simpatias aŭ eĉ malsimpatias.

Aminda viro

Se tia kono daŭras, ni eble revizias nian opinion pri la persono, aŭ ĝi estas konfirmita per nia posta sperto. La norvego impresis nin kiel ege simpatia kaj aminda viro, kaj nia opinio pri li ne ŝanĝiĝis. En la feriejo ni konatiĝis kun multe da afablaj homoj, sed ni trovis lin aparte ĉarma.

Ni tre ĝuis lian prelegon, dum kiu li kantis, kaj igis nin kunkanti, plurajn belajn kantojn, kiujn li persone tradukis el la norvega. Ni plej ŝatis iun sorĉan kanton, kiu havis la titolon „Neniam”.

„Neniam”

**Neniam vi elmemore pasos
En lum’, mallumo ĉeestas vi;
Precipe nokte vin vidas mi
Precipe nokte vin vidas mi.**

**En veturanto aŭ en rajdanto
Mi vidas vin, eĉ en bild’, en kanto;
Mi plej vin aŭdas en mia plor’.
Mi plej vin aŭdas en mia plor’.**

Ĝia melodio, kun leviĝanta tono je la fino de ĉiu strofo, elvokis al mi (kiu neniam estis en Norvegio) melankolian skandinavan etoson, kaj samtempe tiun dolĉamaran senton, kiun la portugaloj nomas saŭdado.

La unua kaj la lasta strofoj tiele tekstas:

Neniam vi elmemore pasos
En lum’, mallumo ĉeestas vi;
Precipe nokte vin vidas mi
Precipe nokte vin vidas mi.

En veturanto aŭ en rajdanto
Mi vidas vin, eĉ en bild’, en kanto;

Mi plej vin aŭdas en mia plor’.
Mi plej vin aŭdas en mia plor’.

O.T. rakontis, ke la kanton komponis aŭtenta viro, kies juna fianĉino mortis, antaŭ ol ili povis geedziĝi. Li dum sia restanta vivo funebris ŝin kaj neniam edziĝis kun alia virino.

Dum jaroj ni ne plu havis kontakton kun O.T., kaj ni ĵus legis en revuo, ke li forpasis je la aĝo de 91 jaroj. Ni tre bedaŭras, ke ni ne plu havis okazon renkontiĝi kun tiom alloga persono. Je lia memoro, mia edzino eksidis ĉe la piano, kaj ni kune kantis „Neniam”.

Garvan MAKAI



La Deklingva manlibro pri politiko de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono.

**Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio,
butiko@fel.esperanto.be aŭ
www.retbutiko.net kontraŭ 9,50 eŭroj + afranko.**

Alklake konsiliĝi



magu, ekzemple, ke vi havas gravan aŭtoakcidenton dum vojaĝo eksterlande kaj via aŭto frakasigas; aŭ ke vi laboras por eksterlanda entrepreno, kiu ne pagas vian salajron; ke vi heredas eksterlandan nemoveblaĵon; aŭ ke vi geedziĝis al eksterlandano kaj ekhavis infanojn, sed volas divorci, kaj via partnero volas reiri al sia hejmlando, sed vi ne scias, kiuj leĝoj validas rilate alimen-ton, loĝadon de la infanoj.

Pro la internaciigo de la vivo pli kaj pli da homoj ekfrontas tiajn komplikajn jurajn situaciojn. Pro tio, en julio, la belga ministro pri justico, Stefaan De Clerck [stefán deklérk], prezentis novan eŭropan portalon en 22 lingvoj kun juraj informoj pri ĉiuj ŝtatoj. Ĝi direktiĝas precipe al advokatoj kaj juristoj, sed evidente ĉiu civitano povas konsulti ĝin.

Nuntempe tiuj paĝoj unuavice informas. Sed iom post iom ili estos ellaboritaj por interaktiva uzo, tiel ke ekzemple eblos trovi demandaron el fremda lando, tradukitan en via propra lingvo; eblos tiam plenigi kaj sendi ĝin, tiel ke ĝi alvenas en la lingvo de la koncerna administracio. De Clerck esperas, ke la portalo helpas harmoniigi la eŭropan juron.

Por konatiĝi kun la portalo sufiĉas alklaki: e-justice.europa.eu/home.do.

Ivo DURWAEL



**Artikolojn pri la vivo
en via regiono
sendu al
moderna_vivo@monato.net**

PEDOFILIO

Emblemoj perversiulaj

Lastatempe oni multe parolas pri pedofilio. Temas pri socia plago, kiu atingas eĉ edukistojn kaj eklezianojn, do tiujn, kiuj ege pli ol aliaj homoj estas vokataj por protekti infanojn.

Oni scias, ke la diversaj institucioj kontraŭbatalas per ĉiuj fortoj tiun fenomenon por identigi la kulpulojn kaj ilin punigi, tiel malebligante, ke estu novaj viktimoj. Tamen ne ĉiam facilas tion fari.

Verŝajne ne ĉiu scias, ke pedofilioj pli kaj pli ofte utiligas specifajn emblemojn por reciproke sin rekonu. Tiuj simboloj, kiuj videblas ekzemple ĉe kolĉenoj, pendaĵoj, brakringoj aŭ tatuoj, disvastiĝas ankaŭ interrete. Estus bone, se ordinaraj civitanoj rekonu ĉi tiujn emblemojn, por pli bone protekti sin kaj familianojn kontraŭ pedofilioj. Eblus tiel, en plej suspektindaj kazoj, eĉ denunci la portanton de tia emblemo al la polico.

Papilio

Emblemoj antaŭ nelonge malkovritaj jenas: du bluaj trianguloj, unu interne de la alia, indikas preferon pri knaboj (stiligataj trianguloj indikas preferon pri tre malgrandaj infanoj); du rozkoloraj koroj, unu interne de la alia, indikas preferon pri knabinoj; papilio kun korformaj, rozkoloraj kaj bluaj flugiloj indikas preferon pri ajnaj infanoj.

Oni provu distingi ĉi tiujn emblemojn por sin gardi kontraŭ tiaj perversiuloj. Se oni iomete atentus kaj kunlaboras, eble ne estas tiel malfacile preventi novajn krimojn.

Roberto PIGRO



La emblemoj havas diversajn signifojn spegulantajn la emojn de pedofiliuloj.

BALKANO

Inter najbaroj malpli da baroj

Pliboniĝas rilatoj inter Serbio kaj ĝia najbaro Albanio. Ekzemple, en albana universitato – en Skadar – malfermiĝos fako pri la serba lingvo. Fiksita estas tago en februaro por honori en Albanio la serban lingvon.

Antaŭe mankis al serboj kaj montenegranoj en Albanio rajtoj, ekzemple pri lingvo, kredo, lernejoj kaj nomoj. Nova registaro kaj alproksimiĝo de Albanio al Eŭropa Unio nun redonas al serboj kaj montenegranoj tiajn

rajtojn. Ekzemple, multaj serboj kaj montenegranoj petas siajn antaŭajn nomojn, malpermesatajn en Albanio ekde 1975. Memorindas, cetere, ke en 1967 Albanio estis deklarita – unue kaj unike en la mondo – ateista lando. Tiam estis detruitaj multaj preĝejoj.

Malgraŭ pli bonaj rilatoj, tamen, restas malsamaj opinioj en la najbaraj landoj pri la sendependeco de Kosovo kaj Metohio.

Dimitrije JANIČIĆ/PG

Celen sursele



Antaŭ 600 jaroj la Litova Granda Duklando etendiĝis ĝis la Nigra Maro kaj estis la plej granda ŝtato en Eŭropo. Ĝis nun en Litovio vivas legendo, ke la litova granda duko Vytautas sian ĉevalon trinkigis per nigramara akvo.

Onidire en la nuna teritorio de Ukrainio, proksime al Odeso, ankaŭ hodiaŭ pendas memortabulo pri Vytautas la Granda.

La legendo inspiris 44-jaraĝan litovan entrepreniston Giedrius Klimkevičius. „Kial ne rajdi ĝis tiu loko, kiel antaŭ 600 jaroj faris la duko, kaj ne trinkigi ĉevalojn per la mara akvo?” iom ŝerce diris la ĉeval-ŝatanto. Tuj aperis profesiaj rajdistoj, kiuj ŝatas defiojn kaj pretis dediĉi siajn feriojn al la projekto.

Por realigi la ideon ili elektis ponean ĉevalrason bredatan en Litovio kaj nomatan „eta samogitiano” (*Zhmud* aŭ *Zhemaichu*). Tiu ĉi ĉevalraso, fama pro sia pacienco, rapideco kaj obeemo, estas unu el la plej malnovaj en Eŭropo, ĝi estas konata ekde la 6a-7a jarcentoj.

Historiistoj

Komenciĝis la vojaĝo la 8an de septembro, la tagon, kiam en 1430 oni intencis kroni dukon Vytautas la Granda kiel reĝon de Litovio. Survoje la raj-



LAST



LAST

La ĉevaloj estas etaj, sed fortaj kaj obeemaj. Post 40 tagoj ili atingos la celon en Ukrainio.



LAST

dantoj, inter ili du virinoj, intencas viziti historiajn lokojn, kiuj rilatas al la Litova Granda Duklando. Ili volas tie paroli kun surlokaj historiistoj.

En la epoko de Vytautas la Granda oni bezonis duonjaron por atingi la sudajn limojn de la teritorio. La nuna grupo, ĉiutage rajdante 50 km, planas atingi

sian celon, la urbeton Oĉakovo en Ukrainio, post 40 tagoj.

La organizantoj neas, ke la ideo naskiĝis pro historia nostalgio. „Ni volas nove fiksi historiajn radikojn de Litovio en la kunteksto de la hodiaŭa Eŭropo”, diris aktivuloj.

LAST

Monda kulturo apud la maro

En Irlando, kiel en aliaj landoj, la somero estas la preferata sezono por festivaloj. Unu el la plej sukcesaj estas la tiel nomata „Festivalo de mondaj kulturoj”, kiu okazas ĉiujare en la populara feriejo kaj marhaveno Dúnlaire [dun lire], sude de Dublino, la irlanda ĉefurbo.

Homoj el multaj landoj, kaj anoj de eksterlandaj komunumoj daŭre loĝantaj en Irlando, kuniĝas kun irlandanoj por dividi kaj ĝui riĉan paletan da internacia kulturo. Patroprenas dancistoj, luktartistoj, kantistoj, cirkoj, muzikistoj, ĵonglistoj, aktoroj – finfine, ĉiaj folkloroj kaj tradicioj.

Cetere dum la festivalo eblas viziti Zen-ĝardenon aŭ ĉeesti kurseton pri bonsajo-arbetoj; lerni ion pri ĉina kaligrafio aŭ hinda tamburado; aŭskulti la ĉanton de tibetaj lamaoj; spekti dancon kaj aŭdi

kantojn el Kubo, Koreio kaj Barato, aŭ rigardi aktoradon de scenoj el la hinda Ramajano.

Esplanado

Laŭ la tuta marborda esplanado vidiĝas budoj, ĉe kiuj oni povas manĝi frandaĵojn el Libano, Palestino, Japanio, Hispanio, Francio, Italio, Germanio, kaj multaj aliaj landoj.

Regas ĝoja etoso en la urbo, precipe en la Popola Parko en Dúnlaire. La evento estas bone organizata kaj ordigata de la *Garda* (polico), la Civila Defendo (kiu fakte ne defendas kontraŭ neekzistantaj malamiko, sed sukuras la publikon), volontulaj purigistoj, kaj kontrolistoj.

La rezulto estas, ke malgraŭ miloj da junuloj (kaj malpli junaj personoj) oni ne notas la malagrablan spektaklon de



GARVAN MAKAI

ebrio kaj konsumado de narkotaĵoj, kiu ofte konstateblas ĉe eventoj kiaj rokfestivaloj. Anstataŭe, la festivalo distingiĝas per afableco kaj amikeco internacia.

Velŝipoj

Ankaŭ la belo de la urbo kontribuas al la sukceso. Kiam la suno brilas – kio ne ĉiam okazas en Irlando – oni regalas sin, promenante apud la maro, sur kiu videblas buntaj velŝipoj kaj jaĥtoj. Ĉe la horizonto montras sin montoj. De tempo al tempo alvenas aŭ forveturas pramŝipoj el, aŭ al, Kimrio. Dume, sur la stratoj de Dúnlaire, aŭdiĝas la lingvoj de multe da landoj kaj etnoj: hinda, tibeta, brazila, ĉina, japana ... eĉ Esperanto.

La semajnfina festivalo daŭras de vendredo ĝis dimanĉo. Ĉi-jare ni partoprenis la sabatan programon, precipe dediĉitan al la kulturo de Azio. Aparta allogaĵo estis la Cirko Kawa el Barato, kies anoj faris nekredeblajn atingojn: promenadon sur tenda ŝnuro, grimpadon sur longa bambua stango apogita sur la ventro de eta barbulo, kiu kulminis per sensacia rotacio de „homa helikoptero” sur la pinto de la stango.

Kvankam partoprenis en la festivalo malpli da homoj ol en la pasinteco – certe pro la ekonomia krizo – la publiko estis gaja kaj kontenta kiel ĉiam. La festivalon oni povas varme rekomendi.

Garvan MAKAI



GARVAN MAKAI

Fotoj: Membroj de la Cirko Kawa el Barato bunte kaj brile distris partoprenantojn en la irlanda „Festivalo de mondaj kulturoj”.

MALLIBEREJOJ

Rajto je minimuma digno



TIM PEARCE

Kun maloftaj esceptoj, italaj malliberejoj prezentas impreson de granda plimalboniĝo. Malobservataj estas eĉ minimumaj kriterioj difinitaj de artikolo 3 de la Eŭropa Konvencio pri Homaj Rajtoj, laŭ kiu karcerulo disponu pri almenaŭ 3,5 m² kaj povu esti ekster la propra ĉelo ne malpli ol ses horojn tage.

En Italio, tamen, en ĉeloj de 6 m² kutime nepras enŝlosi almenaŭ tri personojn, dum 12 m² fojfoje devas sufiĉi por deko da prizonuloj. La tiel nomataj horoj da aero, kiuj laŭ Strasburgo estu tage almenaŭ ses, malaltiĝas en Italio al du.

Alarmon sonigas la itala gazetaro post raporto komisiita de la konstanta observejo pri mortoj interne de malliberejoj. La raporto klare indikas, ke en la 11 malliberejoj, kiujn kontrolis la observejo, prizonuloj ricevas traktadon, kiun la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj difinas „nehoma kaj humiliga”.

Konsekvencoj

La malliberejoj estas plenplenaj, asertas italoj, disetendante la brakojn, sed la konsekvencoj postulus malpli fatalisman reagon. Ekzemple, granda problemo restas enprizonaj memmortigoj.

La neniel honorindan rekordon tenas la malliberejo de Kaljaro, en Sardinio, en kiu ekde 2005 prenis sian vivon 11 el la 50 malliberuloj. Sekvas la milana prizono San Vittore kun 1127 malliberuloj kaj en la sama periodo 13 memmortigoj.

Rimarkindas, ke en la plimulto de la okazoj la memmortigintoj estas junuloj, enkarcerigitaj pro krimoj ne gravaj. Kelkaj el ili estas antaŭ nelonge arestitaj aŭ eĉ proksimaj al elkarcerigo.

Pri Kaljaro oni legas en la raporto: „La konstruaĵo estas kaduka, la bontenado okaza. Ekstere de la ĉelo oni rajtas esti ne ses, sed nur kvar horojn. Instruaj kaj distraj aktivajoj estas tre limigitaj.” Plue, en septembro, oni eksciis, ke en la historia roma malliberejo Regina Coeli (konstruita en 1654) mankas jam dum 40 tagoj varma akvo. Tie 1000 kondamnitoj preparas sin al dua sinsekva vintro sen hejtado.

Higieno

Ĉu akcepteblas, ke en progresinta eŭropa lando, kia devus esti Italio, la malliberejoj entenas 67 580 prizonulojn en spaco, kiu apenaŭ sufiĉas por 44 218, kaj ke fine oni rajtas eĉ ne al minimuma persona higieno aŭ eĉ hejtilo? Tial ĉiujare la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj ricevas milojn da priaj apelacioj.

En Eŭropo, kun ĝiaj homaj rajtoj, mortopuno estas malpermesita. Eŭropanoj indigne kondamnas malproksimajn landojn, kiuj ankoraŭ ĝin aplikas. Ĉu estas tamen pli konsole por eŭropana burĝa kaj filistra konscienco kondamni homon al memmortigo aŭ fari nenion por ĝin eviti?

Ankaŭ tio estas mortopuno, eble ne rekta, sed same grava. Estu konsentite, ke ĉiu, kiu eraris, elpagu sian kulpon ĝis la lasta guto, sed en prizono estas homoj, ne bestoj, kiuj ankoraŭ rajtas je vivo kaj minimuma digno.

Roberto PIGRO

Vakcino preventas kanceron

La homa papilom-virusa infekto estas la precipa kaŭzo de la kancero de la utercerviko.

La unua efika kontraŭkancera vakcino estis vakcino kontraŭ hepatito B. La viruso de hepatito B kaŭzas ne nur la akutajn formojn de la malsano, sed ankaŭ ĉe iuj malsanuloj kronikan hepatiton kaj en apartaj kazoj (verŝajne kune kun iuj aliaj faktoroj) cirozon kaj eĉ heptakanceron. Ĉar vakcinado kontraŭ hepatito B efike preventas ĉiujn formojn de la malsano, el tio sekvas, ke ĝi preventas ankaŭ heptakanceron. En multaj landoj tia vakcinado jam estas enigita en la kalendaron de devigaj vakcinadoj.

Papilom-virusoj estas parazitaj de multaj specioj de bestoj kaj homoj. Ĉe homoj, en la plej multaj okazoj ili kaŭzas sendanĝerajn verukojn – sur la haŭto de la manoj, plandoj, en la seksaj organoj (generiloj) ktp. Sed jam delonge estis suspektinde, ke la apartaj tipoj de la homaj papilom-virusoj povas kaŭzi malignajn tumorojn – plej ofte kanceron de la utercerviko, sed ankaŭ de la anuso, penis, vulvo kaj eĉ de faringo ktp. Tamen multaj sciencistoj eĉ ankoraŭ ĝis antaŭ nelonge opiniis, ke la precipa rolo en tio apartenas al herpes-virusoj. Kaj nur la germana sciencisto Harald zur Hausen definitive evidencigis, ke la precipa rolo en la apero de la kancero de la utercerviko apartenas al la homaj papilom-virusoj. Pro tio la sciencisto en 2008 estis Nobel-premiita „pro sia malkovro, ke la homa papilom-viruso kaŭzas kanceron.”

Harald zur Hausen naskiĝis en 1936, civitano de Germanio. Ankoraŭ en 1970

La malkovro de la precipa rolo de la homaj papilom-virusoj en la apero de la kancero de la utercerviko stimulus la kreadon de kontraŭkanceraj vakcinoj...

Ĝis nun estas kreitaj vakcinoj, kiuj efike preventas heptakanceron kaj kanceron de la utercerviko.

li faris supozon, ke homaj papilom-virusoj povas kaŭzi kanceron de la utercerviko. Dum pli ol dek jaroj li persiste laboris pri tiu problemo. Nur en 1983 li identigis DNA de homa papilom-viruso de la tipo 16 en la ĉeloj de kancero de la utercerviko. En 1984 li tion aperigis rilate al la tipo 18. Tiuj du tipoj de homaj papilom-virusoj estas identigitaj en 70 % de la kazoj de kancero de la utercerviko. La virusoj komence penetras la epiteliajn ĉelojn de la mukmembrano de la utercerviko. Poste la DNA de la viruso kunfandiĝas kun la DNA de la ĉeloj de la utercerviko kaj nur post kelkaj jaroj la ĉeloj povas fariĝi malignaj. Kancero de la utercerviko okupas la duan lokon (post la mamkancero) en la mondo inter ĉiuj malignaj tumoroj de virinoj. Ĉiujare en la mondo ĉirkaŭ 500 000 malsaniĝas je kancero de la utercerviko, el kiuj preskaŭ duono mortas.

El 15 tipoj de homaj papilom-virusoj, kiuj povas kaŭzi kanceron de la utercerviko, la plej danĝeraj estas du tipoj:



ANDRÉS RUEDA

numeroj 16 kaj 18. Precipe la virusoj transmissiĝas per sekskontaktoj. Sed oni ne povas supozi, ke ĉe ĉiuj virinoj infektitaj de la homaj papilom-virusoj – eĉ de la tipoj 16 kaj 18 – nepre aperos kancero. Proksimume nur unu procento el tiuj malsaniĝas je kancero de la utercerviko. Do, verŝajne gravas por tio iuj malfavoraj genetikaj faktoroj, difekto de la imunstatuso, influo de malsanigaj eksteraj faktoroj ktp. Tamen en 99-100 % de ĉiuj kazoj, kiam virino malsaniĝas je kancero de la utercerviko, en kanceraj ĉeloj oni povas trovi la homajn papilom-virusojn, plej ofte de la tipoj 16 kaj 18. Necesas emfazi, ke sen patogena influo de la virusoj apero de kancero de la utercerviko ne estas ebla.

Vakcinado disvastiĝas

La malkovro de la precipa rolo de la homaj papilom-virusoj en la apero de la kancero de la utercerviko stimulus la kreadon de kontraŭkanceraj vakcinoj.

Kaj tiuj vakcinoj estis kreitaj, komence de sciencistoj en Usono kaj baldaŭ ankaŭ en Eŭropo, surbaze de proteinoj (antigenoj) de la homaj papilom-virusoj. Kontraŭ tiuj antigenoj en la organismo de vakcinitoj aperas defendaj antikorpoj, kiuj neŭtraligas virusojn. Nuntempe ekzistas du efikaj vakcinoj. Unu estas direktita kontraŭ kvar tipoj de homaj papilom-virusoj: 6, 11, 16 kaj 18. La dua neŭtraligas du tipojn de la virusoj: 16 kaj 18. Ambaŭ vakcinoj jam estas la plej disvastiĝintaj en eŭropaj landoj kaj Usono. Krome, nun ili estas aplikataj en iuj aliaj landoj de la amerika kontinento, en apartaj regionoj de Azio kaj aliloke. La vakcinoj je 70-80 % imunigas la vakcinitojn kontraŭ kancero de la utercerviko. Kial tio ne estas je 100 %? Pro tio, ke en la vakcinojn estas enigita antigenoj de ne ĉiuj 15 tipoj de la homaj papilom-virusoj, kiuj povas kaŭzi kanceron, sed nur de la plej disvastiĝintaj kaj kancerodanĝeraj.

Bedaŭrinde, tiuj vakcinoj estas sen-

utilaj por virinoj, kiuj jam antaŭ la vakcinado estas infektitaj de homaj papilom-virusoj. Tial, multaj landoj vakcinadas nur knabinojn je la aĝo de 11 ĝis 13 jaroj, ankoraŭ ne atingintajn seksan maturecon. Oni supozas, ke ili ankoraŭ ne havis sekskontaktojn, kaj tial ne estas infektitaj de la homaj papilom-virusoj. Sed iuj landoj vakcinadas ankaŭ pliaĝulojn, eĉ je la aĝo de pli ol 20 jaroj. Sed en tiuj okazoj necesas konvinkiĝi antaŭ vakcinado, ke ili ankoraŭ ne estas infektitaj de homaj papilom-virusoj. Same gravas vakcini ankaŭ knabojn – kio, ekzemple, kvazaŭ jam fariĝas en Britio – por preventi ĉe estontaj viroj kanceron de la penis, anuso ktp. Sed ĝis nun vakcinoj estas sufiĉe multekostaj, kio obstaklas al vasta vakcinado en malriĉaj landoj. Je la aĝo de pli ol 50 jaroj, la plimulto de virinoj jam estas infektitaj de la virusoj, kaj ilia vakcinado estas senutila. Do, la nuntempaj vakcinoj povos preventi kanceron de la utercerviko precipe ĉe la nova generacio de virinoj. Tial tiuj vakcinoj

estas bezonataj en plua perfektigo.

Estonteco de vakcinoj

Ĝis nun estas kreitaj vakcinoj, kiuj efike preventas heptakanceron kaj kanceron de la utercerviko.

En MONATO (2002, 1, p. 16-17) mi skribis, ke „laŭ oficialaj informoj de Monda Organizaĵo pri Sano, nuntempe en la mondo vivaj mikroboj kaŭzas ĉirkaŭ 15 % de ĉiuj malignaj tumoroj”. Kaj inter virusoj mi tiam listigis la virusojn de hepatito B kaj C, la viruson de herpeso Epstein-Barr, la homajn papilom-virusojn, la viruson de T-ĉela leŭkemio kaj aliajn, kiuj en apartaj kazoj (verŝajne kun iuj aliaj faktoroj) povas provoki malignajn tumorojn.

Kontraŭ la viruso de hepatito B kaj la homaj papilom-virusoj jam estas kreitaj vakcinoj. Oni povas esperi, ke en la proksima estonteco, scienco sukcesos bridi ankaŭ aliajn.

Vladimir LEMELEV



La vakcinoj je 70-80 % imunigas la vakcinitojn kontraŭ kancero de la utercerviko.

ALBANIO

Centjariĝo de Patrino Tereza

La 26an de aŭgusto 1910 naskiĝis la verŝajne plej fama virino en la mondo, Patrino Tereza. Ŝia origina nomo estas Gonxhe Bojaxhi [gonĝe bojaĝi], albandevena.

Fruaĝe ŝi jam komprenis, ke ŝi havas mision je la nomo de Dio por servi al la plej malriĉaj inter la malriĉuloj. De Prizeren (Kosovo) al Skopje (Makedonio), poste al Zagrebo (Kroatio) kaj Dublino (Irlando) ŝi maturiĝis kiel vera misiisto kristana por definitive instaligi en Kolkato en Barato. Dum 60 jaroj ŝia personeco radiis tra la tuta mondo, ĉie kie okazis malfeliĉoj, militoj, amasaj epidemioj, kruelaj murdoj. Je la nomo de Jesuo patrino Tereza certigis monon, panon, vestojn kaj rifuĝon al miloj da homoj, kiuj vivis marĝenigite, diskriminaciite, malsataj kaj malsanaj.

Bedaŭrinde, la patrujo, la komunisma Albanio, ne akceptis ŝin ĝis la jaro

1989, kiam ŝi vizitis ĝin kaj la tombojn de la patrino kaj fratino en la urbo Shkoder [ŝkoder]. Estis tempo, kiam la komunisma reĝimo estis ŝanceliĝanta, kio kondukis en la jaro 1991 eĉ al ties falo. Ekde tiam patrino Tereza starigis ankaŭ en sia patrujo plurajn misiejojn, kie deĵoras kaj servas ankoraŭ centoj da fratulinoj katolikaj. Ŝi iniciatis ankaŭ la konstruon de nova granda katedralo de Sankta Paŭlo apud la centro de Tirano. Ŝi persone atendis mem papon Johanon Paŭlon la 2an dum lia vizito en Albanio, printempe 1993.

Kvankam foririnte junaĝe el la patrolando, Tereza neniam forgesis ĝin nek ĝian popolon. Iufoje ŝi diris: „Laŭ la sango mi estas albana, laŭ civitaneco baratan, laŭ la kredo kristana, laŭ la koro misiisto de Jesuo”. Daŭre ŝi diris: „Ni preĝas kaj kredas, ni kredas kaj amas, ni amas kaj servas”.

La albana registaro omaĝe al ŝi deklaris la jaron 2010 *Jaro de Patrino Tereza*. Tiukaze oni aranĝis ekspoziciojn, stariginte novajn monumentojn, prezentante plurajn koncertojn. Lastatempe la urbodomo de Tirano decidis starigi apartan muzeon pri ŝi, rekonstrui la placon samnoman apud la Universitato, nomumi novan *Straton de Patrino Tereza*, kie oni metos ŝtonojn kun la surskribo de mondaj eminentuloj pri ŝi. La albana poŝtoserva kompanio eldonis novajn poŝtmarkojn honore al ŝi. La parlamenta prezidanto aranĝis apartan riĉan fotoekspozicion ĉe la fronto de la parlamentejo, laŭ granda bulvarado. La aktivecoj daŭros dum la resto de la jaro. Similaj aktivecoj okazis ankaŭ en Kosovo, Makedonio, Barato kaj en pluraj aliaj landoj, ĉie kie patrino Tereza postlasis siajn neforviŝeblajn spurojn.

Bardhyl SELIMI



Ŝanĝiganta mondo

Kiam mi kaj mia kara edzino Hortensia forlasis nian hejmlandon kaj venis loĝi en Bailenambeann, Irlando estis tute malsama ol la moderna, progresema lando, kiu ĝi nun estas. Tiam ĝi estis malriĉa, postrestanta, kaj pli-malpli homogena. Sur la stratoj estis malmulte da trafiko. La plej ofta privata transportilo estis la biciklo; publikaj transportiloj konsistis el malnovaj vagonaroj tirataj de vaporlokomotivoj kaj urbaj tramoj; dum en kamparaj regionoj, oni ankoraŭ uzis kabrioletojn kaj ĉarojn.

Iom primitiva telefonsistemo ja ekzistis, sed tiom malmulte da personoj posedis telefonaparatojn, ke ununura presita telefonlibro sufiĉis por la tuta lando.

Kvankam Irlando estis en la jaro 1921 deklarita Libera Ŝtato (poste, en 1948, Respubliko), ĝi estas kvazaŭ teokratio.

**La ŝtata cenzuristo certigis, ke neniŭ maldeca
aŭ malpia libro povu esti legata
aŭ eldonita en la lando.**

**La rezulto estis tio, ke la skribaĵoj de la plej elstaraj
monde konataj verkistoj estis malpermesitaj,
kaj ties libroj devis esti presitaj eksterlande,
kaj kontrabanditaj en Irlandon de tiuj,
kiuj volis kontraŭleĝe legi ilin.**

Laŭdire, la Taoiseach (ĉefministro), Éamon [ejmon] de Valera, kiu estis tre fervora katoliko, faris nenian gravan ŝtatan decidon sen unue konsulti la tiaman timindan ĉefepiskopon John Charles McQuaid [ĝon ĉarlz makŭejd], severan, sed altestimatan klerikon, kiu efektive regis la tutan ŝtaton kune kun la katolika

loĝantaro en la tuta insulo, kaj norda kaj suda, ĝis sia morto en 1973. Dum tiu periodo la mano de la Vatikano, pere de ties peranto kaj vikario McQuaid, peze kuŝis sur la popolo, eĉ sur tiuj, kiuj ne estis membroj de la katolika eklezio. Divorco, abortigo kaj koncipoprevento estis rigore malpermesitaj. La ŝtata cenzuristo certigis, ke neniŭ maldeca aŭ malpia libro povu esti legata aŭ eldonita en la lando. La rezulto estis tio, ke la skribaĵoj de la plej elstaraj monde konataj verkistoj estis malpermesitaj, kaj ties libroj devis esti presitaj eksterlande, kaj kontrabanditaj en Irlandon de tiuj, kiuj volis kontraŭleĝe legi ilin.

Fremdaj (tio estas anglaj) sportoj, ekzemple, kriketo, rugbeo, kaj piedpilkado de la internacia futbala asocio ne rajtis esti ludataj sur ludkampoj de la gaela atleta asocio, kaj gaelaj sportistoj riskis esti elpelitaj, se ili samtempe partoprenis en tiaj „fremdaj” sportoj. La tomboŝtonoj de irlandanoj, kiuj mortis en la Unua Granda Milito, ne aŭdacis mencii tiun fakton, kaj familioj hontis pri la partopreno de siaj anoj en la brita



LULIHOOPS

**El la baltaj landoj venis sufiĉe
multaj da enmigrintoj kaj gastlaborantoj.
Inter ili estis Nola (ne ŝia vera nomo), kiu nun loĝas
en nia urbo.**

**Malkiel la plimulto de la tiel nomataj „novaj irlandanoj”,
ŝi ne apartenas al la rangoj
de freŝaj junulinoj.**

armeo, kaj ĝis antaŭ nelonge silentis pri ĝi.

Tamen, iom post iom, pro la fondiĝo de la respubliko kaj, eĉ pli, post la aliĝo de Irlando al la Eŭropa Komunumo (nun la Unio), la lando moderniĝis kaj komencis vere progresi. Dum la mallonga tempo, kiam Irlando estis konata kiel „La Kelta Tigro” – tio estas la blufe prospera ekonomia konjunkturo, kiu daŭris ĝis antaŭ kelkaj jaroj, kiam la kompatinda animalo estis mortigita de la bankoj kaj la naiva registaro – multege da irlandaj elmigrintoj revenis, kaj gran-

da nombro da eksterlandanoj venis serĉi laboron (kiu tiam abundis) en la Verda Insulo. Precipe enmigris poloj – fakte tiom da ili, ke oni iom troige asertadis, ke la pola (ne la irlandia) iĝis la dua idio de Irlando. Sed la ondo de enmigrado inkluzivis homojn el aliaj landoj de orienta kaj meza Eŭropo, Afriko, kaj Brazilo.

El la baltaj landoj venis sufiĉe multaj da enmigrintoj kaj gastlaborantoj. Inter ili estis Nola (ne ŝia vera nomo), kiu nun loĝas en nia urbo. Malkiel la plimulto de la tiel nomataj „novaj irlandanoj”,

MIK01808

ŝi ne apartenas al la rangoj de freŝaj junulinoj. Neniu scias, kiom ŝi vere aĝas, sed verŝajne ŝi havas proksimume, aŭ preskaŭ, sesdek jarojn. Tio ne estas pruvebla, ĉar ŝi estas junaspekta, sana, kaj admirinde eleganta. Eble ŝi estis vidvino, sed pri tio neniu demandis. Dum la periodo de ekonomia prospero Nola venis al Irlando kun sia filo, lia edzino kaj ilia filineto. La intenco de la familio estis, ke ili loĝu kune, kaj ke ŝi, kiel bona avino, prizorgu la infanon, dum la gepatroj laboras. La tuta aranĝo estis fuŝita, tamen, kiam la filo foriris kun nova amikino (juna advokatinio), forlasante la familion. Samtempe Nola decidis, ke ŝi ne volas ludi la rolon de bona avino. Ŝi pli ŝatas amuzi sin, dancante, ĉeestante koncertojn, kaj ekskursante. Same kiel la filo, ŝi trovis novan amon, mildan, mezaĝan, sed ne tre allogan irlandan kamparanon, kiu bredas kurhundojn. La intenco estis, ke Nola kaj la hundobredanto loĝu kune en lia hejmo, sed post nelonga kunvivado, ŝi decidis, ke ŝi ne ŝatas la kompanion nek la odoron de la leporhundoj, kiuj vivis en la domo kun



MIK01808



la mastro.

Nola estas sufiĉe ĉarma virino kaj plaĉaspekta. Kvankam ŝi certe ne estas riĉa, ŝi ĉiam sukcesas trovi por si la plej modajn vestaĵojn. Surstrate oni tuj rekonas ŝin, ĉar ŝi estas vestita brile bunte kiel amazona papago, kronita de granda ĉapelo, fasono, kiu ne plu estas ofta en Irlando, krom ĉe edziĝfestoj kaj dum la famaj ĉevalkuroj en Galway [galŭej]. Pro la fakto, ke Nola, krom afabla, estas ankaŭ ruza, ŝi sukcesis persvadi la urban konsilantaron cedi al ŝi etan, sed komfortan domon en sociala domaro por pliaĝuloj. Kompreneble, ŝi neniam konfesus, ke ŝi estas pliaĝulino. Kvankam ŝi ne estas juna, ŝi estas tre atleta. Ŝi konstante ekzercas sin, praktikas jogon kaj naĝas. Ŝi konstante admonas siajn konatinojn kaj nekonatojn pri la neceso ĝuste spiri, sane manĝi kaj eviti nenecesajn medikamentojn. Bedaŭrinde, Nola ofte embarasas la virinojn, kies kunulecon ŝi ĝuas. Sidante en kafejo post la meso kun grupo de mezaĝulinoj, ŝi rekomendas pelvajn ekzercojn, kiuj laŭ ŝi pliboni-

gas kaj pliĝuigas la plenumadon de la seksuma ago. Tio vere ŝokas la decajn irlandaninojn de respektinda aĝo, kiuj imagas, ke ili ankoraŭ vivas en la lando de sanktuloj kaj doktuloj (malkrueluloj prefere dirus hipokrituloj), kiu daŭris ĝis la gloraj tempoj de la ĉefepiskopo McQuaid kaj la Taoiseach (poste Prezidanto) de Valera. Eble estas bone, ke tiuj decaj matronoj ne scias, ke malvirto kaj sekso ĉeestis, eĉ en la glora irlanda pasinteco. Ili kutimas aserti ke, „Sekso ne ekzistis en nia lando ĝis la alveno de la televido”.

La kulmino de la ŝokaj kutimoj de Nola estis iu okazo, kiam ŝi ekskursis

kun grupo de amikinoj al la okcidenta marbordo. En tiu memorebla tago ŝi tute senvestigis sin kaj saltis en la maron nuda kiel novnaskita infano. Tia hontinda konduto estas nepermesita sur irlandaj plaĝoj. Kun hororo la grupo rimarkis, ke longa vico de viroj de diversaj aĝoj staras kaj admirante rigardas ŝin, kiam ŝi – kiu ankoraŭ posedas surprize junan kaj bonan figuron – malmergiĝis el la ondoj, kiel Venera aŭ Afrodita.

Nola ne estas la sola interesa loĝanto de Bailenambeann. Ankaŭ nia loka poeto, Oskar Hennesy, meritas mencion. Li ne nur verkas versaĵojn, kiujn li malavare kontribuas al la urbaj ĵurnaloj, sed



CAUSE PERDUE

**En angleparolantaj landoj
oni rigardas iun
irlanddevenan skoton,
nome William McGonagall (1830-1902),
kiel la plej „bonan” poetaĉon en la mondo.**

Ii ankaŭ fondis la bailenambeannan poezian societon, kies membroj renkontiĝas ĉiusemajne en trankvila trinkejo apud la kanalo. En angleparolantaj landoj oni rigardas iun irlanddevenan skoton, nome William McGonagall (1830-1902), kiel la plej „bonan” poetaĉon en la mondo. La kolektoj de la memtitolitaj „Gemoj el la poeziaj verkoj de William McGonagall” estas tre ŝatata libro, kiu eĉ hodiaŭ bone vendiĝas en Skotlando kaj tutmonde. Oni preskaŭ povus pretendi, ke Oskar estas la McGonagall de Baile-

nambeann, kvankam liaj versaĵoj estas malpli memorindaj. Jen specimeno de lia arto:

Alvenis jam la belsomero
La birdoj kantas; jen la vero
En arboj kaj en verdarbedoj
Kaj malpli en la floraj bedoj

Pli ĉarma estas ilia kanto
Ol morna monaĥeja ĉanto
Aŭskultante, mi promenas kun la hundo
Krom kiam sur la kampo estas inundo

Kaj mi imagas en matena helo
Ke mi jam estas en Ĉielo
Pro la melodio kaj la belo
De tiu sezono de la jaro

Ĉe la kamparo kaj la okcidenta maro
Kie aŭdiĝas la kriego de mevo kaj laro.
Dankon, ho Dio, pro tia beno
Kaj en la arbaro, laodoro de la keno.

Mi timas, ke ekde kiam la uzado de la lirika irlanda lingvo ŝrumpis en nia regiono kaj la malbela influo de usona slango pli kaj pli estas konstata, ankaŭ la kvanto kaj kvalito de poezio kaj de veraj poetoj malpliĝas. Oskar estas simpatia viro kaj bona najbaro, kiu laŭ sia kapablo provas daŭre flirtigi la poezian flagon super la verdaj kampoj de la lando.

Feliĉaj ni estas, kiuj nomas la urbon Bailenambeann nia hejmo.

Albisturo KVINK



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturaj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagyi.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
#Prezo ĉe FEL: 24,00 € +
afranko (tradicia bindita
versio), 14,40 € (ePub aŭ
Mobipocket).

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

Homo universala, homo moderna: Johann Joachim Becher naskiĝis antaŭ 375 jaroj

Speyer (sud-okcidenta Germanio), urbo de germanaj imperiestroj, de romanikstila katedralo kaj de la reformacia protesto, aktuale festas kune kun la J. J. Becher-Asocio jubilean naskiĝtagrevenon de homo eksterordinara, kies multflankaj konceptoj efikas ankoraŭ en nia tempo.

Johann Joachim Becher naskiĝis en 1635 en luterana pastora familio en Speyer. Kvankam li post la infanaj jaroj ne plu loĝis en sia naskiĝurbo, li ĉiam menciis sian devenon en la titolpaĝoj de siaj traktaĵoj per la aldono *von Speyer* (germanlingve) aŭ *Spirensis* (latine). Becher multe vojaĝis, unue devige kun la duonpatro al Svedio, Nederlando kaj Italio, poste profesie. Verŝajne li studis en Hajdelbergo. En 1657 li iris al la kortego de la elekta duko de Majenco kaj fariĝis ties matematikisto kaj medicinisto. Tra postenoj en Manhejmo kaj Munkeno li atingis la imperiestran kortegon en Vieno. De tie, komisiite de la imperiestro, li vojaĝis al Nederlando. En Meklenburgio kaj Anglio li provis solidigi sian financon kaj profesion vivon. Jam en 1682 li mortis en Londono, kie li entombiĝis en la preĝejo St James in the Field.

Becher estis universala homo. Plej altan renomon li akiris kiel ekonomiisto en la tiama epoko de la merkantilismo, kiam naciaj ŝtatoj komencis strukturi sian ekonomion kaj provis atingi aktivan komercobilancon kaj aŭtarkion per altigo de la propra produktado kaj per reduktado de la importoj. Por tiu celo

Becher kreis, komisiite kaj financate de la regantaj tavoloj, modelajn laborejojn kaj manufakturojn por la produktado de vitro, lanaĵoj, papero, silko, porcelano ktp ... Li okupiĝis pri la klerigado de la laboristoj kaj pri ilia saneco. Interalie li postulis ankaŭ la klerigan edukadon de la virinoj kaj reduktadon de la almozuloj per labor- aŭ vendo-lokoj.


Por altigi la labor- kaj enspezo-nivelejn li inventis aŭ plibonigis maŝinojn kiel ŝipoj, mueliloj, segiloj, tempo- kaj temperatur-mezuriloj, teksiloj, faris ĥemiajn eksperimentojn, plifaciligis la



J. J. Becher

elfosadon de krudmaterialoj. Li enkondukis novajn plantojn kiel terpomoj, morusarbojn por silkoproduktado, sukerkanon. Por la transporto de la varoj li elpensis la ligan de la grandaj eŭropaj riveroj, projekton, kiu realiĝis, sed nur en la dek-naŭa jarcento. Por la konservado de la esperataj ŝtataj riĉaĵoj li planis unuecan monunuon kaj ĝeneralan landan bankon.

En siaj verkoj pri politiko kaj ŝtatteorio, Becher postulas rezigni pri malegala traktado de homoj, ŝtatan instruadon, kreon de riĉaĵoj nur per laboro, socian helpon (kie necesa), zorgon




Signoj, samtempe numeroj kaj vortoj legeblaj per diverslingvaj vortaroj

ankaŭ por la posteuloj. Ankaŭ tiuj ideoj trovis plenumon nur multe pli poste, kaj eĉ hodiaŭ evidentiĝas saĝaj.

Krom la specife ekonomiaj intereso-
soj, Becher multe traktis science pri la naturo, ekzemple pri la mineraloj, pri bestoj, pri plantoj, specife pri kuracaj herboj, pri medicino. Kaj li ne neglektis la malpli erudiciajn homojn. Libron kun

popolecaj konsiloj li privarbis tiel : „Ĉio en altgermana lingvo, ilustrita, distra kaj kompleta, kaj proza kaj poezia”. Kiel klera homo, mem traktante en laŭdire dek lingvoj, li konis la komunikadan problemon. Ankaŭ tiurilate li prezentis solvon: Sistema de signoj kune kun pluraj vortaroj pontu almenaŭ surpapere inter diversaj lingvoj.



Lingva projekto Karakter...



Titolpaĝo de la traktaĵo
Animosaĝeco

Nelaste li skribis pri filozofio, pri la moralo, pri la individua kaj la grupa feliĉo. Sian libron *Psychosophia, das ist Seelen-Weisheit* („Psikozofio, tio estas saĝeco de la animo”) pri la ekkono de

JJB-breco

La jubilean 375an naskiĝtagrevenon de la *Polyhistor* („multsciulo”) Johann Joachim Becher, devenanta el la palatinata Speyer, oni honoris tie ne nur per altranga festkunveno kaj sciencaj prelegoj, sed ankaŭ, kiel decas por omaĝi inventiston, per nova inventaĵo.

Speyer ja estas „la urbo de la breco”, ĉiujare festante eĉ „Brezelfest” (*breco-festeno*), la plej grandan popolfeston ĉe la supera Rejno, kun gaja festprocesio kaj plezurmejlo. Okaze de la Becher-eventoj lerta brecisto inventis novan formon de la bakaĵo. Al la tradicia aspekto de du brakoj interkruciĝantaj, kiujn oni povas interpreti kiel la lite-

ron B laŭ la familia nomo, li aldonis la inicialojn de la antaŭnomoj (J kaj J). Tiel li ne nepre plibeligis la klasikan prastilon, sed almenaŭ duobligis la pezon de la foje mola, foje kraketanta nutraĵo, disdonita malavare kune kun glaso da bona palatinata vino donace post la oficiala Becher-soleniĝo. Alia avantaĝo, se ne novaĵo, estis la uzado ne de blanka nenutra, sed de bruna, plenvolora faruno.

Se Becher vivus ankoraŭ, li certe provus utiligi la ideon por novaj enspezoj. En Speyer la breco ja estas konsiderinda ekonomia faktoro, sed ankaŭ tie oni ne pli gajnas per altigo de la pezo, sed preferas, kiel ĉie, altigon de la prezo.

Franz-Georg RÖSSLER



JJB-breco: oni ne pli gajnas per altigo de la pezo, sed preferas, kiel ĉie, altigon de la prezo.

Dio, li taksis la esenco de siaj verkoj. En ĝi li instruas, ke la filozofio instigas uzi la racion, kaj ke la teozofio („la saĝeco pri Dio”) gvidas al la dia sfero. Li do dividas la kampon kaj tiel evitas mezuri la teologion per la racio.

Homo kun tiom da interesoj kaj kapabloj, protagonisto de la klerigado kaj de la racio, tamen havas siajn obskurajn flankojn. Ja ŝatata de siaj komisiintoj riĉuloj, li ĉiam devis lukti por la propra vivtenado. Tial li ne evitis spekulaciajn provojn ŝanĝi la sorton. Ekzemple, kiel la mezepokaj alĥemiistoj, li provis pro-

dukti oron el sablo. Sed li tion ne faris sekrete en kamereto, sed grandskale ĉe la marbordo. La rezultoj tamen ne valoris la penon, ne konvinkis la monodonintojn kaj ne plenigis la propran konton. En sia libro *Malsaĝa saĝeco aŭ saĝa malsaĝeco* Becher iom memmoke mencias aliajn fantomojn, kiujn li postkuris: la ŝtonon de la saĝuloj, la eternan lumon, la kvadratigon de la cirklo, la *Perpetuum mobile* (la ĉiaman moviĝadon).

Liaj verkoj estas preskaŭ nesupervideblaj, des pli, ĉar li en sia propra listo ofte mencias nurajn projektojn, kvazaŭ

ili jam estus aperintaj. La taksado de la persono kaj de la verkado ne estas identaj. Pri la personeco oni konsentas, ke li pro siaj orgojlo, mokemo, malkonstanteco ktp multe malhelpis sin mem. Sed multaj laŭdas liajn inventaĵojn, lian percepton de la sociaj necesoj, lian vizian rigardon al la ebloj de la estonteco. Pro sia multflankeco, disŝiriteco, viziemo Becher aspektas antaŭtempa moderna homo, kiu lanĉis ideojn, kiuj validas ankoraŭ nuntempe, post pli ol tri cent jaroj.

Franz-Georg RÖSSLER

Ideoj, konceptoj, maksimumoj de J. J. Becher (1635-1682)

Ankaŭ klera homo antaŭ 300 jaroj vidis la mondon tra la okuloj de la propra tempo. Do, ĉu oni taksu la subajn opiniojn de J. J. Becher postrestintaj, reakciaj, avangardaj, modernaj? Ĉu la postuloj estas atingindaj, atingitaj? Ĉu iamaj ekkonoj ĝis nun efektiviĝis en progresoj? Ĉu ili daŭre restas komunaĵo de la socio aŭ denove perdiĝas? Kiel rilatus la nuntempa homo al la temoj? Almenaŭ oni povas konstati, ke nenio nova estas sub la suno.

Libereco apartenas al ĉiu homo ekde la naskiĝo, kaj ĉiu estas same valora kiel ĉiu alia.

Bona edukado de la junuloj estas la fundamento de la ŝtato.

La regantoj estu virtaj, ĉar la popolo speguliĝas en ili.

La ordinaruloj ne ekzistas por la superuloj, sed la superuloj por la ordinaruloj.

Hodiaŭ nenio estas pli kutima ol trompa ŝajnigado. La homoj montras sin amikaj, nur por eluzi la proksimumojn. Sincereco aspektas kiel stulteco.

Oni admonu homojn, kiuj formanĝas kaj fordrinkas sian havaĵon kaj, malriĉiĝinte, postulas de la komunumo subtenon por si kaj siaj infanoj.

Fremduloj ne parolu indigne kontraŭ la gastigantoj.

La infanoj de la gastlaboristoj kun tempopaso fariĝas enlandanoj, kiuj ŝatas sian novan patrujon tiom, kiom iliaj gepatroj ŝatis sian iaman.

Tro da ŝtatoficistoj elĉerpas la kason de la ŝtato. Pli bone estus malmultaj bone salajrataj, ol multaj neniofarantoj.

Niaj ŝtataj oficistoj atentu, ke neniu fraŭdo, trompo, superruzado, malordo okazu en la merkato, kaj tute ne – riske de perdo de deĵoro kaj honoro – mem implikiĝu en tiaĵojn.

Diboĉa mastrumado de la superuloj kaj leĝeranima vivado de la ordinaruloj korodas la financojn de respubliko ĝis ĝia baldaŭa pereco.

La ŝtata mono restu en la lando, kaj, se eliranta, estu protektata.

Kiu havas monon, tiu ne volas labori, sed pagas la laboron.

Sen mono la mondo fariĝus egala. Neniu devus labori por aliuloj, kaj ĉiu devus labori mem.

Devus esti eble skribi interkompreniĝi per komunaj signoj. Same bone estus inventi universalan lingvon facile lerneblan, konvene uzeblan, agrable paroleblan. La ĝisnunaj

provoj estas tro artecaj, tro abundaj, tro komplikaj, nepraktikeblaj. Malaperu nenecesaj vortoj kaj gramatikaj variaĵoj.

Por paco, kiu ne rapide forvaporigu, necesas, ke la homoj lingve komprenu sin.

Produktado kaj konsumado en la ŝtato devas esti en ekvilibro. Socio ne povas akcepti sendistinge ĉiun, kiu venas.

Registaroj efikigu, ke junuloj, senlaboruloj, malriĉuloj, almozuloj povu ricevi laborlokon en ŝtataj labordomoj aŭ aliaj publikaj institucioj, por ke ili per sincera burĝa enspezo kontribuu al la propra kaj la ŝtata bonfarto.

Oni malpermesu inventojn, per kiuj oni perdas homajn laborlokojn.

Estas pli bone instrui la malriĉulojn ol subvencii ilin.

Multaj homoj vivas kiel stultaj bestoj. Pasas tagoj, en kiuj ili eĉ ne pensas, ke ili estas homoj kaj tute ne, ke ili zorgu pri la proksimumoj kaj ties klerigado.

Estas homoj, kiuj laŭdire studadas por poste instrui kaj regadi la aliulojn, sed estas finfine pli mallertaj, malsper-taj kaj malbonkonduktaj ol la ordinara metiisto kaj kamparano.

Kiu timas dornojn, ne pluku rozojn.


Franz-Georg RÖSSLER

Flaŭra enigmo

Serĉu la 12 vortojn en la grizaj ĉeloj rilate al flaŭro.

Bonvolu sendi vian solvon antaŭ la unua de januaro al enigmoj@monato.net aŭ al Flandra Esperanto-Ligo, Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio. 3 da gajnos libropremion.

Sukceson!



Horizontale:

- 1 magia objekto/ne haltas/elementa
- 2 kiango R/eluzis/daŭra/subjekton/pulvorigi R
- 3 sovaĝa bovo R/tagnokto R/familiano R/pene klopodi por enigi R/malgrasa/rifuĝeja
- 4 trinkaĵo varma R/kredema/eksiĝi R/grasa homo R/ludantara/ne pli ol
- 5 cedi R (inverse)/genra/abdomeno R/kalcita globeto R/batalu
- 6 rilata al senodora gaso/dependigi R/la seksaj organoj R/islama vicreĝo R/pimpinela

7 etega/materiera/fari ruĝa R/konstante forpreni ies posedaĵon R/spatelo R
 8 koleoptera/germana urbo (inverse)/korpoparton/akva vaporo R/kovru per flava metalo
 9 pelva ost/palpharego R/artefarita silko R/poezio R/malgranda hemiptero R
 10 jarfina renkontiĝo/blanka mineralo/aliula/antikva nordafrika gento R/konifera arbo R/lirika poemo R
 11 produktas molekulojn/vigla verko muzika R/rivoluis/pritrakti krudferon R/komercaĵo R
 12 multe bonhumoran/varmegon/facon/kneblebla/svarmon de veziketoj
 13 provizi per bataliloj R/TF/eligi el si idon/centran parton de rado/alkala salo R/moviĝi
 14 tre hele flavan/gaje loga R/ekloĝu/rilata al hejma servisto/stato de kvietigita manĝobezono/numeralo
 15 supernatura estaĵo R/trinkujo R/Ne/speco de elektrontubo R (inverse)/speco de vitro R/enuiga
 16 mallongigo de fosforo R/rusa mezurunuo de pezo R/sengusta artaĵeto R/ĵazo R/potencia spirito R/iu koloro
 17 plantmalsano R/malgranda korpuso en romana armeo R/fremda korpo R/aeran koboldon/musosimila mamulo
 18 spirebla gaso/neleĝe komerci R/antaŭhistorian/okulfrape koloran planton/peco de pafilo/unuo de elektra rezistanco R
 19 difina artikolo/batala metio R/multedro R/aroma turfarbusto R/dio de la ventoj/dromiceo R
 20 iu litero/memorilo R/permesi R/faras tratuon/kruda petrolo/duversa strofeto R
 21 malgranda papilio R/korinklino R/kaŭzante multan tumulton R/rilatan al regula sesedro/nacio/aserta
 22 ornama vegetaĵo kun brilkoloraj floroj R/ventega vetero R/epokon/genta scienco R/rilata al ĉiu de la eklezia pastraro
 23 ne difektita R/lakso R/rilate al afrika birdo relative granda/malrapida/kondamno/diservo je la 15a horo R
 24 nobelon/longorela ŝarĝbesto R/tibeta pastro/rilata al iu pensobjekto/sacerdota kleriko

Vertikale:

1 klinko R/ekstrema paro de nazo R
 2 enĉizaĵo R/de iu afrika lando/rilata al natria hidroksido (inverse)/stangeta montrilo R
 3 tera satelito R/el nigra ligno malmola/rilata al politika doktrino/memmasturbadu
 4 metala plato R/fokula mamulo R/neŭrono R/brulaĵo R/malgranda R
 5 monaĥino R/korektita pri astigmatismo R/ĉarpentaĵo R/infano
 6 fendas/de kaŭkaza regiono/manĝebla krucifero R/prefikso okatoma/malviro R
 7 muziknoto/osta/arbo kun flugilharaj fruktoj R/pelikaneca birdo R/rilata al ŝtona monumento por mortinto
 8 ekkona/kastrita taŭro R/sufikso/forpreni ŝirante R/bova
 9 sovaĝa porko R/CH₃CO- /matematike parenca R/hidrokarbono R/kuiro per milda fajro R
 10 aviadila turniĝo R/piktograma/subtilodore/flavmalsana
 11 peĉa/travidebla gemo R/kartludo R/linearo
 12 satano R/plurjaran herbon kun dentaj folioj/metala ronda najlo R/kunigi plurajn fadenojn
 13 konstrufrotan/ĝiras/nombro dividebla nur per si R/instrumento R
 14 malgranda venena serpento R/nia planedo R/tamen/pecetigi R/kolekto de malnovaj islandaj poemoj R
 15 dum/ruiniĝa R/situante ekster/kvanto de materio R/plej grasa parto el la lakto R
 16 pensaĵo R/regnestron/kampara poemeto R/kana
 17 afrika enloĝanto R/longforma ronda objekto R/akcelan agon/antikva greka monereto
 18 koncernanta la vivon/anon de futbalteamo/kormo R/de iu azia lando
 19 riveran kankron/fikcia R/impeto R/plurala pronomo
 20 infangrupo R/rivero inter Germanujo kaj Polujo R/plej malalta vira voĉo R/komenciĝis/gento R
 21 mucidi R/azia enloĝanto R/ridingiga intenco malbonfari R/farto R
 22 distinga vorto R/skemo R/rilata al malgranda ĉevalo/marteson
 23 malkognato R/malsilenta persono R/avenuon/citrongusta
 24 ambaŭseksa/biciklan/muzika sono R/efekta
 25 citrusa/milde flustri R/ludkarto R/fiŝo kun piramidforma kapo/furoro
 26 juvelŝtono multvalora/demanda pronomo R/registara regno R/natria kloro/kajtono R
 27 erara R/atingo/ido blankula kaj mulata/superflua
 28 inklino nedaŭra/procentega/kunordiga konjunkcio/ĉio, kio impresas flarsenton/numeralo (inverse)
 29 tedan/metamorfozi/iu kontinento R/kalia salo ruĝa
 30 vortfiniĝo ebligante paŭzeton R/ŝirmo R/multvalora metalo/eskorton
 31 juĝista uniforma robo longa R/science esplori R/formo de agato R/perceptebla radiado (inverse)/membro

R = radikvorto

Solvo de la litera sudoku

(Monato 6/2010)

Evidentiĝis, ke la nombro 39 ne malfacilis diveni, ĉar multe da ĝustaj respondoj alvenis. Tri respondintoj ricevos libropremion, nome Rodrigo de Carvalho Mendonça (Brazilo), Irina Butnorienė (Litovio) kaj Martin Häggström (Svedio). Gratulojn!

Nur la maniero solvi ne estis tiel evidenta ĉar eblis diversmaniere atingi la solvon. Tial mi prezentas la du versiojn.

T	R	I	D	E	K	N	A	Ŭ
A	D	E	T	N	Ŭ	R	K	I
K	Ŭ	N	R	I	A	T	E	D
D	E	K	A	R	I	Ŭ	T	N
I	A	Ŭ	N	K	T	D	R	E
R	N	T	Ŭ	D	E	K	I	A
N	I	R	K	A	D	E	Ŭ	T
E	T	D	I	Ŭ	R	A	N	K
Ŭ	K	A	E	T	N	I	D	R

T	R	I	D	E	K	N	A	Ŭ
A	D	E	T	N	Ŭ	R	K	I
K	Ŭ	N	R	I	A	T	E	D
R	E	K	A	D	I	Ŭ	T	N
D	A	Ŭ	N	K	T	I	R	E
I	N	T	Ŭ	R	E	K	D	A
N	I	R	K	A	D	E	Ŭ	T
E	T	D	I	Ŭ	R	A	N	K
Ŭ	K	A	E	T	N	I	D	R



La Origino de Specioj

Karolo Darvino

Mendu ĉe via loka libroservo
aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
www.retbutiko.net
retbutiko@fel.esperanto.be
Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko
(papera versio),
14,40 € (ePub, Mobi, PDF)

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.
La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis
nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.
Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis
ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda,
eĉ legenda, por ĉiuj,
kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

anoncetoj

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzempler. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

Trevor Steele



**Flugi kun
kakatuoj**

Trevor Steele



**Flugi
kun
kakatuoj**

FEL

Estas la lastaj jardekoj de la 19-a jarcento, kaj eŭropaj potencoj ŝajne nehaltigeble kolonias aliajn kontinentojn. En la brita kolonio Okcidenta Aŭstralio blankaj setlantoj ignoras la rajtojn de la aborigenoj, murdas aŭ forĉasas ilin de la tradicia teritorio, aŭ permesas al ili resti kaj servi kiel senpagajn laboristojn sur nove kreitaj bienoj.

Eldonjaro: 2010

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 256 paĝoj,

ISBN: 978-90-77066-46-1; prezo ĉe FEL: 16,50 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 8,00 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be